

REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

4. VII. BOHEMA REVUO ESPERANTISTA. 1913.

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.) (OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).

Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.

Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 = 1½ Sm. Účet pošt. spoř. 93.281.

(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)

La redakcio rezervas al si la rajton aranĝi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.

Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 — 1½ Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio Dresden-Bankejo Arnhold.)

PRI ORHARA REĜIDO

KUN STELO SUR FRUNTO, SUNO SUR BRUSTO KAJ ĜISKUBUTE ORAJ BRAKOJ.

(*Popolrakonto, kiun la aŭtoro — s-o Fr. Štupar — aŭdis antaŭ tridek jaroj kaj verkis laŭ notoj tiame faritaj.*)

Foje vivis reĝino, kiu havis nur unu filon. Kiam la filo maturiĝis, ekregis kaj estis edziĝonta, li ne volis preni princinon, kiel aliaj reĝidoj kaj kiel tion postulis la patrino, sed li publikigis en sia regno, ke li edziĝos kun tiu knabino, kiu konsideras sin kapabla plenumadi la mastrumajn devojn, eĉ se ŝi estus plej malriĉa.

La regnanoj konsideris la reĝan publikigon ŝerco, kaj pro tio neniu knabino anoncis sin preta, edziniĝi kun la reĝo. La reĝo atendis dum unu jaro, kaj ĉar tio estis vana, li elsendis senditojn en ĉiujn partojn de sia regno, por ke ili kaŝe esploru, kiel oni juĝas pri lia edikto.

Unu el tiuj senditoj venis al tre malriĉa patrino, havanta tri filinojn kaj pasigis nokton en ŝia domo. Kiam oni vespere parolis pri la reĝo, diris la plej aĝa filino: „Se la reĝo edziĝus kun mi, mi ŝpinus en unu horo tiom da ŝpinaĵo, ke mi teksus el ĝi tolon por tiom da ĉemizoj, ke oni povus vesti per ili du regimentojn."

La mezaĝa filino diris: „Mi bakus en unu horo panon por du regimentoj, se la reĝo edziĝus kun mi."

Kaj la plej juna filino diris: „Kaj se la reĝo edziĝus kun mi, mi naskus al li orharan filon kun ora stelo sur la frunto, suno sur la brusto kaj oraj brakoj ĝis la kubutoj kaj orharan filinon."

La sekvintan matenon la sendito revenis al la reĝo kaj rakontis al li, kion li estis aŭdinta. La reĝo venigis la plej aĝan knabinon kaj demandis ŝin: „Ĉu vi kuraĝas plenumi tion, kion vi promesis tiuvespere?"

„Mi kuraĝas," respondis la knabino.

Oni pretigis linon, sed antaŭ ol la knabino komencis ŝpini, la horo pasis.

La reĝo venigis la mezaĝan knabinon kaj demandis ŝin, ĉu ŝi kuraĝus plenumi sian promeson. Ĉar ŝi jesis, oni alportis al ŝi farunon, sed antaŭ ol ŝi estis preta, la destinita horo estis pasinta.

Nun la reĝo venigis la plej junan knabinon kaj ankaŭ ŝin demandis, ĉu ŝi povus plenumi sian promeson. Kaj ĉar la knabino jesis, la reĝo edziĝis kun ŝi.

Nun ekmilitis malamiko kontraŭ la regno kaj la reĝo devis militiri. Dume la reĝino naskis orharan filon kun stelo sur la

frunto, suno sur la brusto kaj ĝiskubute oraj brakoj kaj orharan filinon.

Sed la patrino de la reĝo ne povis toleri la bofilinon, ĉar ŝi ne estis reĝidino, sed de simpla deveno. Tial ŝi forprenis la infanojn, metis ilin en korbeton kaj ĵetis ilin en la maron. Kaj al la bofilino ŝi submetis hundon kaj katinon. Al la reĝo ŝi sciigis, kian posteularon li havas, kaj treege kalumniis la bofilinon.

La reĝo, post la finita milito, furiozege revenis hejmen kaj diris al la edzino: „Mi ne mortigos vin, sed mi tiom vin malhonorigos, ke vi neniam povos vin purigi.“ Kaj li enmasonigis ŝin ĝiszone meze de la placo kaj starigis al ŝi gardiston, kiu devis atenti, ke ĉiu preteriranto kraĉu al la reĝino en la vizaĝon. Kiu ne farus tion, estu mortpafita.

Sur malgranda insulo de vasta maro vivis tiutempe ermito, al kiu ĉiutage anĝelo alportadis panbulon el la ĉielo. Iun tagon la anĝelo alportis tri panbulojn. La ermito miris kaj meditis, kion tio signifu. „Eble li havas laboron aliloke kaj li ne povos veni dum du tagoj,“ li pensis, manĝis unu panbulon kaj la du aliajn li enpoŝigis kaj iris promeni sur la marbordo. Baldaŭ li ekvidis korbeton. „Kio eble estas en ĝi?“ li sin demandis kaj prenis la korbeton el la maro. Ekvidinte la belegajn infanojn, li ekmiregis (ili scie estis la reĝaj gefiloj), sed li tuj divenis, kial li hodiaŭ ricevis tri panbuletojn. Li prenis la korbon, portis la infanojn domen kaj satigis ilin per pano, moligita en akvo. De tiam la anĝelo alportadis po tri panbuloj tage.

La infanoj bone prosperadis kaj bele kreskis. Tiel ili vivis sep jarojn. La anĝelo informis pri ĉio la ermiton, kaj kiam ĉi tiu estis mortonta, li senvualigis al la infanoj ilian staton kaj instruis ilin pri ilia estonta vivo kaj konduto. Li donis al la knabo nodbastonon, per kiu li frapu la teron, kiam li ion bezonos. Tuj aperos okpieda ĉevalo kaj plenumos lian ordonon.

La ermito mortis kaj la zorgitoj dece lin enterigis. Poste ili decidiĝis iri hejmen, kaj la knabo frapis per la bastono la teron. Tuj aperis antaŭ li la okpieda ĉevalo.

„Kion vi deziras?“ ĝi demandis.

„Portu nin en la regnon de nia patro,“ petis la knabo. La ĉevalo tion faris.

Alveninte en la hejmolandon, la knabo aĉetis nigran ŝafon, ordonis ĝin senhaŭtigi, prenis nur la felon kaj faris el ĝi du ĉapojn: unu por la fratino, unu por si, por ke ili kaŝu la orajn harojn kaj li la stelon sur la frunto. La avino kaj la akuŝistino, kiu ŝin helpis en ŝia malbona ago, meritis punon; tial la reĝido volis veni hejmen nekonata kaj ĉe okazo rakonti al la patro la nigran malbonfaron.

(*Daŭrigo.*)

EL HISTORIO DE LA HORLOĜO.

(Laŭ la bohema verko „Dějiny hodinářství“ de Č. Viedemann.)

(Fino.)

Historie memorinda estas la akva horloĝo, kiun la kalifo Harun al Raŝid prezentis donace al la germana regnestro „Karolo la Granda“ en la jaro 807.

Sur granda ciferplato de horloĝo estis la horoj signitaj per dekdu truoj. Ĉiam post unu horo malfermiĝis unu el la truoj, kaj tiom da metalaj globetoj, kioma horo estis, falis tra la truo sur grandan kupran teleron, kiu per laŭta eksono anoncis la horon. Je la dekdua horo aperis sur la ciferplato du figuroj de kavaliroj kun kompleta armilaro, kiuj ĉirkaŭiris la ciferplaton, refermante samtempe la truojn. Movigata estis la horloĝo per akvo, sed ne estas konate, kiamaniere. En la j. 1660 estis en Italujo de nekonata eltrovinto konstruita horloĝo, kiu dum longa tempo ĝuis simpation kaj sufiĉe estis uzata. Ĝi konsistis el metala cilindro dividita interne je ok fakoj aŭ kameroj. Tie troviĝis akvo, kiu tra malgrandaj truetoj en la dividaj parioj malrapide trafluadis el unu kamero en la alian. Tra la centro de la cilindro estis kondukita metala akso, kuŝanta horizontale en du lagroj sur stablo. Sur ambaŭ plilongigitaj ekstremaĵoj de la akso estis volvitaj ŝnuretoj kun peziloj. Sekve de trafluo de la akvo el unu fako en la alian ŝanĝis la cilindro senhalte sian pezpunkton kaj malrapide turniĝis, ĝis fine ĉiu akvo enfluis en la lastan kameron, kio laŭ la konstrumaniero daŭris dekdu aŭ dudek kvar horojn. Montrilo, fiksita sur unu aksa ekstremaĵo, montris la horon sur ciferplato.

Orontius Finaeus donacis al la franca reĝo Francisko I. akvan horloĝon, kiun li mem konstruis. Horizontala, iom pli ampleksa akso kuŝis turneble en lagroj. Ĉirkaŭ ĝi estis volvita ŝnuro kies fino estis ligita sur masto de malgranda ŝipo, flosanta en ujo sur akvo. Tra malgranda malfermaĵo elfluadis malrapide la akvo el la akvujo, la ŝipo malaltiĝadis samtempe kun la nivelo de la akvo, trenante post si la ŝnuron; tiu turnis la akson, sur kiu ankaŭ la montrilo estis fiksita.

Similan horloĝon, sed en mala maniero, konstruis jezuito Kircher, kiu ĝin donacis al la imperiestro Ferdinando III.

En negranda vazo sur akvo naĝis dukapa aglo; du tubetoj kondukis la akvon el supra parto en la kapon de la aglo, kiu tra malfermitaj bekoj ĝin ellasadis en la vazon, mem supreniranto per la altiĝado de akvo. Per siaj bekoj li samtempe montris la horojn sur plato.

Eĉ olea horloĝo iam aperis. Ĝi estis tre praktika, ĉar ĝi nokte lumis. La ideo estis tute simpla. En vitra vazo estis oleo,

kie brulis meĉo. Pro la brulkonsumado de oleo malaltiĝadis ĝia nivelo kaj per tio la tempo estis mezurata.

Ekzistis ankaŭ tiel nomata „magneta horloĝo“, kiu per sia mistera aranĝo kaŭzis grandan miron, sed efektive ĝi estis nenio alia ol ludilo. En vitra vazo sur akvo flosis ligna globo, en kies internon estis horizontale metita magneta stango.

La globo estis ĉirkaŭ la ekvatoro dividita je 24 partoj, je kiuj montris montrilo, fiksita sur la vazo aŭ ia figureto, ekzemple birdeto per sia beko. Tiu ĉi aparato staris sur tableto, en kiu estis kaŝita alia potenca magneto, kiu helpe de radara aparato unufoje en 24 horoj turniĝis. Tiamaniere ankaŭ la globo sur akvo devis turniĝadi. Kompreneble la aparato en la tableto kaŝita mem sen magneto kaj sen globo povis servi kiel tempomezurilo.

La horloĝoj suna kaj akva dum multaj centjaroj pli malpli kontentigis la homaron, ĝis fine ilin anstataŭis la horloĝo radara.

La radara horloĝo en tia senco kaj en tia konstruo, kiel ni ĝin hodiaŭ havas, estis eltrovita nur en la tempo pli malfrua, ĉar tre longe daŭris, ol fine la homa sprito venis al la ideo, la liberan kaj seninterrompan turniĝon de la radoj reguli aŭ pli ĝuste reteni por malrapida kaj proporcia turniĝado per speciala meĥanismo, nomata „paŝo“ (fr. Echappement, germ. Hemmung).

La „paŝo“ en la horloĝo kaŭzas, ke la radoj ne turniĝas rapide kaj seninterrompe, sed dento post dento malrapide antaŭenpaŝas. La rapideco de la paŝoj estas precize regulebla.

Malfacile estas nomi la eltrovinton de radara horloĝo. Multaj opinias ĉefdiakonon Pacifiko en Verona ĝia eltrovinto. Aliaj nomas Gerberton, kiu vivis je 200 jaroj pli poste. Gerbert naskiĝis en Auvergne en Francujo kaj en la jaro 999 li suriris la papan tronon sub la nomo Silvestro II. Li konstruis ne sole la radaran horloĝon, sed ankaŭ kun la horloĝo kunigitan aparaton, kiu batanoncis la horojn sur sonorilo.

Sed la tiama horloĝo devis esti tre zorgeme regulata, ĉar tiam ankoraŭ oni dividis la tagon de la suneliro ĝis la sunsubiro en ĉiu jartempo je dekdu horoj. Tiel ekzemple ni legas en la historio pri la unuaj institutoj de premonstratoj la ordonon, ke la preĝejservisto pri la horloĝo bone zorgu, por ke ĝi batu antaŭ la tagiĝo. Laŭ tio ni vidas, ke tia horloĝo ne batis ĉiujn, sed sole unu difinitan horon. Io simila, kiel ĉe la hodiaŭaj vekiloj. Tia horloĝo kompreneble estis tre malofta kaj sole la plej riĉaj monaĥejoj ĝin posedis. Ĝian fidindecon bele dokumentas la aludo de pastro Aleksandro, kiu skribas, ke la preĝejservisto de benediktina monaĥejo en Cluny en la j. 1108 iris kelkfoje dum la nokto observi la stelojn, por ke li povu difini la tempon kaj doni signon por matena preĝado. ne kredante al la monaĥeja horloĝo.

En la 13. jarcento estis la radara horloĝo jam pli ofta. La plej rimarkinda tiame estis horloĝo, kiun la egipta sultano Saladin en la j. 1232 sendis donace al la germana imperiestro Frederiko II. Ĝi montris la ĉirkaŭiron de suno, luno kaj aliaj planedoj helpe de radoj, movataj per peziloj. Eĉ dekdu signoj de zodiako troviĝis en la horloĝo. La prezo de tiu aparato estis taksita je 5000 dukatoj, sumo por la tiama tempo grandega.

En la sama jarcento oni trovas jam en kelkaj urboj de Italujo horloĝojn, kiuj eĉ ĉiun horon batanoncis.

En Anglujo tiam verŝajne ne estis multaj horloĝistoj; tion pruvas la pasportoj de tri majstroj el Nederlando, al kiuj Eduardo III. en la jaro 1368 tre kompleze permesis en Anglujo ekloĝi: „ad horologiorum artificium exercendum“ = por praktiki la arton horloĝistan. Simile estis en Francujo, ĉar Karolo V., nomata „saĝa“, venigis el Germanujo Henrikon de Wicka, por ke li konstruu horloĝon, kiu sur la turo de la reĝa kastelo en Parizo en la j. 1370 estis starigita. Tiu ĉi artisto havis loĝejon sur la turo, por povi prizorgadi la horloĝon, kaj li ricevadis tagan rekompencon 6 sous (12 Sd). Li do havis tre altan situacion, sed salajron tre malaltan.

En Strassburg estis konstruita horloĝo en la j. 1370. Tiu ĉi horloĝo krom la kutima tempodivido montris ankaŭ la ĉirkaŭiron de suno, luno kaj de la ceteraj planedoj. Super la ciferplato troviĝis bildo de Dipatrino, antaŭ kiu ĉiam tagmeze aperis statuoj de sanktaj Tri Reĝoj, faris profundan riverencon kaj refoje malaperis. Poste ekkriis pli supre koko, svingante samtempe la flugilojn.

Tycho de Brahe, la fama astronomo, kiu vivis dum regado de Rudolfo II. en Praha, posedis por siaj astronomiaj laboroj horloĝon, kiu havis sole tri radojn. La plej granda, kies diametro estis unu metro, havis 1200 dentojn.

Tiama horloĝo ne havis ankoraŭ pendolon, sed balancilon en formo de horizontala trabeto, kiel la balancilo ĉe pesilo. La pendolon eltrovis Christiano Huyghens, fama matematikisto, fizikisto kaj astronomo, kiu en la j. 1657 liveris al la holanda registaro la unuan horloĝon kun pendolo.

La horloĝkonstruado estis arto libera, ne havante sian propran gildon. Nur en la jaro 1500 fariĝis aparta fako de tiu ĉi meĥanika arto kaj en la jaro 1544 fondiĝis la unua memstara gildo de horloĝistoj en Parizo.

Je fino de la 17. kaj komence de la 18. jarcentoj multe da astronomoj kaj matematikistoj sin okupadis per esploroj kaj eltrovoj en la horloĝkonstruado kaj la rezultatojn de ili atingitajn uzis ankaŭ la horloĝistoj ĉe praktika laboro. Sole per tio oni povas klarigi la pli rapidan progreson de la tiama horloĝistarto.

F. Novák.

INFORMOJ PRI LA BOHEMA NACIO.

Datrevenon de naskiĝo de **J. A. Komenský** festis la bohema nacio la 28. de marto. (*1592 †1670).

Franca revuo „Les Marches de l' Est" eldonis, kiel ni raportis jam en la marta n-o, specialan kajeron tute dediĉitan al Bohemujo. Ĝi estas volumo de 100 paĝoj, kiu per sia bone elektita enhavo kaj bela aranĝo rimarkinde antaŭenpuŝos la interkonatiĝon de la franca publiko kun la bohema nacio kaj fortigos la reciprokajn simpatiojn, kiujn aludas la eldonejo en sia antaŭparolo. Enhavo de la kajero estas riĉa, varia kaj trafe karakteriza. Adolphe Delaunois en la artikolo „Prague" entuziasme priskribas la ravan belecon kaj pentrindecon de Praha. L. T. Demay (Une exemple: Les Sokols) kun admiro raportas pri la grandioza organizo „Sokol". Dr. H. Jelínek prezentas belan revuon de laboro de poeto Vrchlický. G. D. citas historian rememoron: „Bassompierre en Bohême" kun montrajo el liaj memoroj. Ely Souzdal ĉarme pentras en aro da artikoloj la vivon kaj la popolan arton en la moravia kaj hungaria Slovakujo. H. Jelínek kaj Marc Legrand prezentas en franca traduko montrajojn de la bohemaj kaj slovakaj popolkantoj. Adrien Mithouard („La Ferveur de Prague") priskribas la entuziasman akcepton de Francoj en Praha. Georges Ducrocq daŭrigas la impresojn kaj rememorojn rakontitajn en la libro „Nos Frères de Bohême", de geedzoj Jeanue kaj Frèdèric Regamey. Louis Thomas skribas pri la restado de Chateaubriand en Praha kaj citas lian propran skizon. Plue estas tie kolektitaj kelke da pensoj de la bohemaj patriotoj: Havlíček, Kollár, Bolzano, Jungmann, Dobrovský, Komenský, Balbín kaj Šafařík, represita la deklaracio, kiun la bohemaj deputitoj akceptis en la landa parlamento 1870 kontraŭ anekto de Alsaco-Lotringo per Germanujo kaj fine estas aldonita sufiĉe detala franca bibliografio pri Bohemujo. Ni varme rekomendas al samideanoj komprenantaj la francan lingvon, ke ili mendu ĉi tiun specialan kajeron. Prezo Fr 1·50. Adreso: Paris, VI. rue de Vaugirard 84.

Pri Bohemoj en Chicago publikiĝas la gazeto „Dom", redaktata de Radič en Zagreb leteron, kiun ricevis deputito Lupis de unu Bohemo el Chicago, kiu interalie citas, ke Chicago havas nun pli multe ol 2.000.000 da homoj, inter ili ĉirkaŭ 125.000 Bohemoj, kiuj havas tie siajn bankojn, kvar bierfabrikojn, 15 grandajn fabrikojn, unu altan lernejon, 20 elementajn lernejojn, 7 preĝejojn, 100 kuracistojn kaj advokatojn, 15 apotekojn, 400 viandvendejojn, 400 gastejojn, 500 magazenojn ktp. La bohema kapitalo atingas ĉi tie unu kaj duonon de miliardo da kronoj. — ***Kaj en Wien, la poliglota ĉefurbo de la aŭstria monarkio, malpermesas la magistrato al 400.000 tie loĝantaj Bohemoj malfermi privatan lernejon (por kiu ili konstruis el sia propra mono modernan palacon), same kiel ilin brutece subpremas la landa parlamento de Malsupra Aŭstrio, maldevigante per speciala leĝo fondadon de ĉiuspecaj publikaj lernejoj negermanaj. Kontraŭe en la bohema ĉefurbo Praha, kie inter 612.000 loĝantoj estas sole 34.000 Germanoj (preskaŭ ekskluzive Hebreoj), zorgas la magistrato pri germanlingva kleriĝado de la germanaj infanoj, konstruinte por ili supernombran kvanton da elementaj kaj burĝaj lernejoj, tiel ke en kelkaj klasoj de gimnazioj sidas po 7—15 lernantoj.***

La centa datreveno de naskiĝo de Samo Tomašík, kiu verkis la **slavan himnon** „Hej slované", okazis la 8. II. 1913. Li estis evange-

liana paroĥestro kaj slovena poeto. Ĝi estis aŭtune 1834 (en la sama jaro kaj tempo, kiam ankaŭ Bohemo F. J. Škroup verkis melodion de la bohema nacia himno „Kde domov můj?“), kiam la juna 21-jara Tomašík, vojaĝante Germanujon, haltis en Praha kaj tie plena de malĝojo kaj senespereco pro la tiame ĉiereganta germana lingvo kaj pro la tristaj kulturaj cirkonstancoj ekkantis siajn versojn, kiuj poste fariĝis nacia himno de Slovakoj kaj pli malfrue tutslava kanto, himno de Slavaro. Tomašík mortis la 10. II 1887.

ORBIS PICTUS — LA MONDO EN BILDOJ.

(J. A. Komenský — Comenius: 1654.).

KOVY. Olovo jest měkké a těžké. Železo jest tvrdé, ještě tvrdší ocel. Vysoké ceny jest zlato, z něhož razí se dukáty; po něm přichází stříbro, ze kterého se dělají zlatníky. Z cínu se hotoví konvice; z mědi kotle, z mosaze svícny. Magnet přitahuje železo. Rtuť jest tekutá, pohyblivá a zžírá kovy.

*LA METALOJ. **Plumbo estas mola kaj peza. Fero estas malmola, ankoraŭ pli malmola estas ŝtalo. Altvalora estas oro, el kiu oni stampas dukatojn: post sekvas arĝento. el kiu oni faras florenojn. El stano estas fabrikataj kruĉoj; el kupro kaldronoj; el latuno kandelingoj. Magneto altiras feron. Hidrargo estas fluida, moviĝema kaj mordas metalojn.***

STROM. Ze semene vyrůstá pláň. Z pláně stává se stromek. Stromek mění se v strom. Strom opírá se o kořen. Z kořene vzniká kmen. Kmen dělí se ve větve a ratolesti, které jsou složeny z listí. Vrchol jest nejvýše. Pařez tkví na kořenech. Špalek jest uťatý peň bez větví a má kůru a lýko, dřevo a dřeň. Jmélí roste na větvích; větve také vypocují stromové klí, pryskyřici, jantar, smůlu a j.

*LA ARBO. **El semo elkreskas planto. El planto fariĝas arbeto. Arbeto transformiĝas je arbo. Arbo sin apogas je radiko. El radiko altiĝas trunko. Trunko dividiĝas je branĉoj kaj branĉetoj, kiuj konsistas el folioj. Supro estas plej alte. Trunkbazo teniĝas per radikoj. Ŝtipo estas dehakita trunko sen branĉoj kaj havas ŝelon kaj baston, lignon kaj medolon. Visko kreskas sur branĉoj; branĉoj eksudas ankaŭ gumon, rezinon, sukcenon, peĉon k. a.***

OVOCE STROMŮ. Ovoce česá se s ovocných stromů. Jablko a pomoranč jsou kulaté. Hruška a fík jsou podlouhlé. Třešně visí na dlouhé stopce; švestka a broskev na kratší; moruše na kratičké. Ořech vlaský, lískový a kaštan jsou zavinuty v kůru a slupinu. Plané stromy jsou buď listnaté, jako lípa, olše, bříza, topol, buk, jasan, vrba, dub, jenž nese žaludy; aneb jehličnaté, jako jedle, sosna, smrk, modřín, které nesou šišky. Jalovec a vavřín nesou bobule. Z pecky kávovníka připravuje se káva, z listů čajovníka čaj.

*LA FRUKTOJ DE ARBOJ. **Fruktoj estas deŝirataj de fruktarboj. Pomo kaj oranĝo estas rondaj. Piro kaj figo estas longformaj. Ĉerizo pendas sur longa pedunklo: pruno kaj persiko sur malpli longa; morusbero sur tre mallonga. Juglando, avelo kaj kaŝtano estas envolvitaj en ŝelo kaj membrano. Sovaĝaj arboj estas aŭ foliohavaj, ekz.: tilio, alno betulo, poplo, fago, frakseno, saliko, kverko, kiu portas glanojn; aŭ koniferoj, kiel abio, pino, piceo, lariko, kiuj portas konusojn. Junipero kaj laŭro portas berojn. El kerno de kafarbeto estas preparata kafo, el folioj de tearbetaĵo teo.***

REVUO DE LA REVUOJ.

AKADEMIA DECIDO pri lingvaj eraroj en esperantaj verkoj.

La Akademio

rimarkinte kun bedaŭro, ke ofte aperas esperantaj verkoj, kiuj enhavas multajn lingvajn erarojn, ke pro diversaj kaŭzoj tiuj verkoj ne estas sufiĉe severe recenzataj de la esperanta gazetaro kaj ke tiu nesevereco estas trompo por la publiko kaj povas malutili evoluon de nia lingvo, donante al la publiko malbonajn ekzemplojn,

rekomendas:

al la gazetaj recenzistoj, ke ili estu pli severaj kaj ke ili ĉiam zorge notu la lingvajn erarojn, kiujn enhavas la recenzita verko;

al la verkistoj, ke ili ĉiam legigu siajn verkojn antaŭ la eldonado, ĉu de iu kompetenta Lingvo-komitatano, ĉu de iu kritikista komitato;

al la naciaj societoj, ke ili interkonsentu kun la naciaj subkomitatoj de la L. K., nun fondataj, por starigi, kiel jam faris la B. E. A., tiujn kritikistajn komitatojn, al kiuj la verkintoj kaj la eldonistoj povos sin turni por esplorigi la publikigotajn verkojn kaj ricevi iam garantion pri ilia lingva korekteco.

Ni aldonas al ĉi tiu oficiala komuniko, ke ekzistas speciala asocio de esperantaj literaturistoj „E. L. A.“, kies membroj (pagante jare K 2·40) havas la rajton postuli konsilojn por siaj eldonaĵoj, tralegadon de la manuskriptoj k. t. p. Adreso: S-ino M. Hankel en Dresden, Nicolaistrasse 18.

Ĝenerale oni multe kongresos en 1913. Se iu Esperantisto volus viziti nur ĉiujn esperantistajn kongresojn, semajnojn, tagojn ktp., li certe povus vojaĝi dum la tuta somero kaj devus veturi ankaŭ al Italujo, kie en Romo okazos la Katolika Kongreso. Almenaŭ ĉi tiu kongreso havos lokon en Italujo, kie oni volis sed ne povis aranĝi la IX. Universalan . . . Kiam estos pasinta la Naŭa en Berno kaj la Deka en Parizo, ĉu ne estos tempo por la decido, ke oni kongresu nur ĉiun duan jaron? La esperantistaro pligrandiĝas, la arango de niaj kongresoj universalaj estas jam tre malfacila laboro, por kiu oni bezonas multe da tempo kaj forto... Vere — mi opinias, ke oni lasu ĉiun duan jaron libera de universala kongreso. La naciaj asocioj ktp. kongresu en ĉi tiu libera jaro. Ambaŭ aranĝoj certe profitos rilate la nombron de la partoprenantaro kaj montros eĉ ankoraŭ pli entuziasmigan bildon ol nun, ĉar la entuziasmo ne estos tiel laŭkutima!

(*El „Pošta Esperantisto“ IV. 3.*).

*   *

Hachettova revue **„La Revuo“** uveřejnila v posledním (80.) čísle esperantský překlad úryvků ze spisů J. A. Komenského (viz Kühnlovu učebnici), jimiž seznamuje se čtenářstvo celého světa s názory největšího Čecha — prvního propagatora idee pomocného umělého jazyka. Tento článek o tak důležitém historickém dokumentu upozorní zároveň na připravovanou esper. publikaci „O Komenském“.

Dr. Jos. Domec vydal nedávno tiskem svou thesi (Bordeaux 1913) „De tumeurs hystiques de l'ovaire à contenu gazeaux“ a předeslal resumé celého díla, napsané esperantsky. Rovněž jeho francouzská předmluva jest hodna naší pozornosti: „Sbíraje látku

vztahující se k thematu mé práce, čerpal jsem ze mnoha děl, napsaných téměř ve všech evropských jazycích. Jejich překládání způsobilo obrovskou, nezřídka zcela zbytečnou ztrátu času, protože nejčastěji bylo konečně konstatovati, že přeložený článek neobsahuje nic pro moje thema zvlášť zajímavého. Proto byla by naše úloha velmi usnadněna, kdyby na konci každého původního článku nebo díla, kterých jsme použili, byl uveřejněn výtah psaný jazykem mezinárodním, každému pochopitelným. Takový jazyk mezinárodní již existuje — totiž Esperanto. Mnoho profesorů, autorit lékařské vědy, mezi jinými světoznamý prof. Bouchard, předseda spolku lékařů-Esperantistů ve Francii, prof. Bergorié z Bordeaux a věhlasný prof. Ch. Richet — již dávno vřele doporučují myšlenku, aby původní díla z lékařství byla doprovázena esperantským výtahem. O této myšlence bylo již velmi podrobně promluveno v doktorské práci dr. Pierre Correta „Utilité et possibilité de l' adoption d' une langue internacionale en medécine" (Paris 1908). Upozorňujeme na toto obsažné dílko každého, kdo se o tuto věc zajímá. Pokud nás se týče, abychom podepřeli výroky dr. Correta, řekneme jen tolik, že po osmiletém studiu latiny a němčiny, nikdy se nám nepodařilo přeložiti bezchybně latinský nebo německý text. Velká většina kolegů, se kterými jsem o této věci hovořil, ukázala se býti stejně slabou, ačkoliv studovali stejně dlouho. Naopak ale, několik dní studia Esperanta stačilo nám, abychom přeložili bezvadně text esperantský."

(*Z lékařského časopisu esperantského „Kuracisto"*.)

„Český Sběratel" přinesl v prvních třech číslech 1913 článek „O míšeňském porculánu" s několika illustracemi, který přeložil K. Procházka z esper. brožury vydané míšeňskou manufakturou.

P. Zoffmann dánský učitel v Koldingu podává v listopadovém čísle (1912) časopisu *„Danlando"* podrobnou esp. zprávu o své cestě, kterou podnikl koncem září 1912 za podpory města Koldingu po Čechách a Moravě, aby studoval české školství. Neznaje ani češtiny ani němčiny, používal výhradně Esperanta, a čeští učitelé-Esperantisté byli mu ochotnými průvodčími, podrobně jej informujíce o našich poměrech. Také v úvodnících čtyř čísel učitelského časopisu dánského rozepisuje se o neobyčejně zdařilém výsledku své cesty, za který děkuje znalosti Esperanta.

Řada pražských časopisů referovala o cestě prof. Pitlíka. — Časopis Českých *Učitelů* zmiňuje se ve článku sl. Šupichové o Esp. učitelském svazu.

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

Ze života Eskymáků Mořské vlny připlaví často kmeny z jižnější pevniny ke břehu Gronska. Eskymáci sbírají je a staví z nich své chýže. Protože nemají skla, dělají okna z ledu. Nemají také kamen, jimiž by vytápěli chýže. Lampa naplněná olejem, na němž splývá hromada knůtků, ohřívá světnici. Kromě toho má Eskymák kožichy, jimiž se přikrývá. V létě opouští chýži, aby se ubytoval ve stanu. Zajímavé jsou též pohřební zvyky Eskymáků. Mrtvolu úplně oblečenou zabalí do kůže, jež zemřelému sloužila dříve za lůžko; k tomu přiloží ještě jeden oděv, aby měl zásobu na onom světě. Pak ovinou kol mrtvoly provaz, jímž tělo vlekou po sněhu nebo po zemi jako saňky (ježto se mrtvoly neradi dotýkají) k místu, kde je dosti kamení. Tam přikryjí mrtvolu na ochranu

před psy, liškami a krkavci. Záhrobí jest jim světem materielním. Lovcům kladou poblíže hrobu sáňky, člun a lovecké nářadí; jeho psy uškrtí a nechávají mu je zapřaženy. Ženě přikládají ke hrobu kahan a dřevěný rámec, na němž sušívala obuv a rukavice; také misku nebo hrnek na rozpouštění sněhu, trochu tuku a sirek, aby mohla vařiti; rovněž jehlu, náprstek a jiné šicí potřeby. Také rdousívali nemluvňata a vkládali s matkou do hrobu, aby se jí po nich nestýskalo. Stan, kde zemřel Eskymák, pak opouštějí.

